STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1973 5 (35)

# ĈE AMIKOJ EN GUS ĤRUSTALNIA

**La sekva artikolo,kiun verkis post sia vizito en Sovetunio d-ro Zdeněk R u s í n,prezidanto de la Distrikta Revizia Komisiono de Socialisma Junulara Ligo(SJL)kaj vicprez.de LG ĈEA en Teplice, celas montri, ke eblas samtempe aktivi kiel esperantisto kaj funkciulo de grava socia organizaĵo, kaj iniciati fondadon aŭ rektan helpon al Kluboj de internacia amikeco. Pri la sukcesa vizito rakontis la 26.5.ankaŭ la regiona gazeto "Priziv" aperanta en Vladimir (USSR).**

En aprilo-majo mi vizitis per la Vagonaro de Amikeco /ĉeĥe : Vlak družby/ Sovetunion kiel ano de dupersona delegacio de la Distrikta Komitato de SJL. Post kelktaga restado en Moskvo kaj en la regiona urbo Vladimir ni atingis la celon de nia vojaĝo - la urbon kaj distrikton Gus Ĥrustalnia. Kun la ŝtataj kaj partiaj organoj de tiu ĉi urbo havas la distrikto Teplice jam plurjarajn amikecajn kontaktojn. Same la distrikta organizaĵo de SLJ en Teplice ekkontaktis pasintjare la komsomolan filion en Gus. La tieaj komsomolanoj vizitis nian distrikton en novembro 1972 kaj nun ni do reciprokis la viziton.

Gus Ĥrustalnia estas grava industria centro kuŝanta en profundaj belaj arbaroj. Karakterizas ĝin grandaj vitro- kaj teksaĵ-fabrikoj.La unuan tagon de nia restado ni vizitis du 10-klasajn lernejojn. En la unua, portanta la nomon de K.Marx, nin akceptis ĝia direktorino,estrino de la Pionira organizaĵo, kaj profesoro pri matematiko, k-do Lebedjev, esperantisto, kun kiu mi korespondas unu jaron. Unu junpionirino prezentis al ni kun klarigoj ekspoziciaĵojn de la muzeo de Marx, instalita en la lernejo. Nin surprizis, kiom da interesaj kaj valoraj materialoj,rilatantaj la vivon kaj verkaron de Marx, kolektis la pioniroj kaj komsomolanoj. Similaj ĉambroj-muzeoj ekzistas ĉe pluraj sovetaj lernejoj,grave rolante en la idea eduko de la infanoj. Nia enskribo en la memorlibron tie estis trilingva : ĉeĥa,rusa kaj esperanta.

En la alia lernejo nin agrable impresis diversaĝaj infanoj,kiuj prezentis popolajn dancojn kaj baleton. Dum nia tuta restado en Sovetunio ni kelkfoje spektis dancojn kaj baleton kaj ni devis konstati,ke ilia estetika kaj prezenta nivelo estis tre altaj.

La muzika lernejo de Gus Ĥrustalnia troviĝas en nova,moderne ekipita domo. Al ties konstruo plejparte kontribuis la gusaj komsomolanoj, laborplenuminte ĉi tie milojn da horojn. Adiaŭante la lernejon ni donacis al la direktorino du kantarojn de la plej popularaj ĉeĥaj kaj

(daŭrigo sur la 5-a paĝo)

# JAK DÁL S PLACENÍM ČLENSKÝCH PŘÍSPĚVKŮ

Letos, kdy chceme dosáhnout plné konsolidace nejen v řadách svazu,ale i navenek - vůči politickým a státním orgánům, kdy usilujeme o plné uznání našeho hnutí jako rovnoprávného partnera ostatním zájmovým organizacím, se musíme zamyslet nad systémem a způsobem placení členských příspěvků svazu i nad okolnostmi,které s tím souvisejí.

Předně si všimněme současného stavu a zkušeností. Máme čtyři kategorie příspěvků u činných členů a navíc kategorii přispívajících členů, přičemž maximální výše příspěvku činí měsíčně 4 Kčs. To je celkem nepatrná částka vzhledem k jiným výdajům, které jsme ochotni poskytnout mnohdy na nevýznamné či nepotřebné věci. Přesto však ještě v květnu bylo asi 700 členů všech těchto kategorií, kteří svoji povinnost nesplnili.

Byli jsme nuceni urgovat a takřka prosit, aby člen svazu, esperantista(!) pomohl svazu z obtížné finanční situace. Je to správné a únosné ? Proč chceme, aby svaz zajišťoval, byť skromně, naše potřeby a staral se o zabezpečení zájmů celého hnutí, nemá-li mít ani prostředky na nájemné, světlo, poštovné nebo mzdy ?!

Domnívá se neplatící člen, že tyto výlohy může předsednictvo či tajemník hradit ze s v é mzdy ? Proč tedy tvrdí,že je esperantista, když svým přístupem napomáhá spíše k likvidaci svazu ?

Na naši výzvu -která kromě částky za poštovné nestála svaz nic, protože práci, včetně rozmnožení a zajištění papíru, provedli obětaví členové svazu - - jsme dostali několik hezkých, ale také několik hrubých dopisů, jejichž pisatelé nevybíravým způsobem napadli předsedu svazu a předsednictvo.Byli bychom velice rádi, kdyby se podobná "iniciativa" projevila v opravdové praktické práci. A protože mezi těmi, kdo nám napsali, byli i členové z Prahy a okolí, je na nich, aby pomohli v sekretariátu ČES i v pražském klubu.

Ano,přátelé, když se dívám na práci zpovzdálí, mohu mít námitky, protože neznám všechny důvody, proč to či ono je právě takové a ne jiné. Budeme vděčni za váš zájem či kritické připomínky,ale prosíme o v h o d n o u formu tohoto zájmu. Budeme dokonce rádi, převezme-li některý kroužek část činnosti,kterou my nejsme schopni z časových důvodů vůbec vykonávat.

Téměř čtvrtina našich členů nesplnila ještě v květnu svoji základní povinnost, čímž si samozřejmě způsobila zbytečné nepříjemnosti ; namísto Starta přicházejí urgence, protože nikdo neví, zda adresát chce či nechce být nadále členem svazu.

Předsednictvo ČES se touto situací zabývalo, a zamýšlí změnit termín placení příspěvků, aby došlo k nápravě. Víme, že koncem a počátkem roku má každá rodina vyšší výdaje a tudíž příspěvky platí až později. Chceme proto požádat všechny naše místní skupiny a ostatní kroužky, aby členské příspěvky vybraly j i ž v e 4. č t v r t l e t í, t a k, a b y b y l y p o u k á z á n y s v a z u n e j - d é l e d o k o n c e p r o s i n - c e t.r. Svaz tím získá již na počátku roku přehled o stavu členstva.

Tento způsob placení by odpovídal přirozené potřebě svazu : mít k dispozici prostředky již počátkem roku, mít možnost daleko lépe plánovat náklad Starta, být operativnější při jednáních, kde je třeba přehledu o stavu členstva a jeho složení a tím lépe realizovat naše společné cíle a služby pro vás všechny.

Z. Křimský

INVITO AL KUNLABORO

Hungara Esperanto-Asocio invitis al ČEA fondi komisionon kun la celo eluzi E-on en turismo kaj organizi turismajn vizitojn pere de ambaŭ asocioj. ČEA alvokas la LG kaj EK pripensi siajn eblecojn k transpreni la peradon inter la ĉeĥa kaj hungara partoprenantoj. ČEA subtenos laŭeble ankaŭ finance agadon de tia komisiono kaj raportados en Starto pri la rezultoj atingitaj.

LA TRADICIAN E-FERIADON EN MIEDZYGÓRZE aranĝos fine de septembro Pola Esperanto-Asocio.ČEA estos reprezentata de membro de CK' L. Rýznar. Informojn pri la feriado liveros: PEA,ul.Jasna 6,00 013 Varsovio

# Inundo de neologismoj?

Kun simpatio mi legis la artikolon de V.Pechoč "Caveant consules" en la 2-a numero.Mi preferus titoliĝin : Quo vadis,Esperanto ? Jes, abundas neologismoj kaj miaj en- kaj eksterlandaj geamikoj ofte atentigas min pri ili, ke mi uzadu ilin, ĉar "ili ja aperas en PIV"! Pleje estas atakataj la "mal" - vortoj, se ili jam posedas sinoniman novan formon. Mi tute ne scias, kial eĉ lingvaj spertuloj malŝatas tiun ĉi prefikson !? La neologismoj ne malofte ja povas konfuzi komencantan nespertan esperantiston. Kelkfoje mi atentigis,ke- - proponante necesajn neologismojn /ekz.teknikajn,sciencajn/ - ni atentu ankaŭ la konsiston de la novaj radikoj, por ke ili ne aspektu kvazaŭ radikoj nekonataj, kompletigitaj per iu afikso. Bedaŭrinde ekzistas jam nun sufiĉe multaj tiuspecaj eĉ nefakaj neologismoj,divenprove ekz.: agrost-id-o, agap-ant-o, akr-id-o, akt-in-o,alid-ad-o, am-id-o, konten-er-o, klink-er-o, klip-er-o, kant-in-o, it-in-er-o ktp.

Ŝajnas,ke minacas estontece ekzisti du E-oj, unu literatura, komprenebla sole al klerulo kaj la alia por "simplaj" homoj, do iuspeca "Basic Esperanto". Respondecaj pri tiu ĉi evoluo estas ne nur la akademianoj, sed ankaŭ ĉiuj verkistoj kaj fakuloj, kies tasko estas krei fakajn terminarojn. Sed ili atentu, ĉu estas nepre necese proponi tute novan vorton por certa nocio, nome,ĉu la respektiva nocio ne estas esprimebla per kunmeto de la jam konataj vortradikoj, same kiel ofte okazas en la lingvoj naciaj. /eto/

N O T O D E L A R E D A K C I O : S-ano Pechoč kaj -eto provu traduki iun ajn artikolon el faka revuo. Ili mem tuj trovos, ke ili estas senpovaj, se ili volas eviti fakajn terminojn, neekzistantajn en la tempo de Zamenhof. Ĉiu studanto de iu ajn scienco aŭ fako nepre devas unue ellerni la fakan terminaron de sia fako (nacilingvan, ĉe medicino aŭ teologio ankaŭ latinan). Estas granda,daŭre netolerebla manko de Esperanto, ke ĝiaj fakaj terminaroj ekzistas ĝis nun nur dise-mise, plejparte tute nehaveblaj. Tio estas unu (eble la plej grava) kaŭzo, kial faka literaturo praktike ne ekzistas en E-o, kaj kial al juna homo,demandanta : "Kiel helpos Esperanto, se mi ĝin ellernos, al mi en mia profesia erudicio?" , ni devas sincere respondi nur : "Apenaŭ".

Jes, estas ega avantaĝo de E-o, ke ĝi,kontraŭe al la latina, povas facile krei kunmetaĵojn. Tamen tie, kie la komplikiteco de la nocio nepre postulas kunmetaĵojn de la kunmetaĵoj, oni d e v a s l e r t e k a j s i s t e m e krei neologismojn, sed samtempe ilin precize difini kaj adekvate registri.

Do, batali kontraŭ fakaj neologismoj estas neprudente. Male, ni devas batali por ilia s i s t e m a kreado kaj publikado en terminaroj. Bazo de tiu ĉi agado devus esti la DUDEN-vortaro, super kiu m o d e l e eklaboris s-ano Eichholz en Ontario antaŭ 10 jaroj. Bedaŭrinde li ĉesis, forlasante la verkon ĝis duono preta, enhavanta centojn eĉ milojn da gesamideanaj laborhoroj, nefinita, nepublikita, do senfrukta kaj vana. Ankaŭ UEA komencis sistempe eldonadi fakajn terminarojn sisteme en formo de la Duaj Jarlibroj - bedaŭrinde ankaŭ ĝi ĉesis.

Jen caveant consules !

Se iu el la fakaj neologismoj poste enradikiĝos ankaŭ en la komunuza skribata kaj parolata lingvo, tio montros nur, ke ĝi estas bezonata kaj utila por la progreso de la lingvo. (Fx)

## Samideana kroniko

En aŭgusto ĝisvivis 75 jarojn František S l a v í k en Praha, ĝis 1946 oferema laboranta honorofica sekretario de EAĈSR, kiu havis ĉe li (Uralské nám.) sian sidejon.Gratulon kaj bonan sanon !

Forpasis la 10.3. en Hořice Adolf P a v l í č e k, aĝa 83 jarojn.

Sepdekjariĝis la 19.1.Teo N o v o t n ý en Liberec, esperantisto depost 1913.

Doktoriĝis pri medicino la 11.7. Miluše F r á n k o v á, Brno. Gratulojn!

# Verda agentejo raportas

BULGARIO - Esperanton oni instruas en pli ol 100 lernejoj kun 2500 infanoj.Dum la pasintaj kvar jaroj preskaŭ 600 instruistoj partoprenis korespondajn kursojn pri E-o.

JUGOSLAVIO - La ministerio por kulturo kaj klerigo de Slovenio oficiale invitis ĉiujn instruistojn kunlaborantajn en la 5-landa eksperimento al la 7a Kunordiga Konferenco, kiu okazis inter la 18a kaj 20a de julio en Maribor.

ITALIO - Kiel informis Radio Roma, la ĝenerala sekretario de Socialisma Internacio certigis, ke li metos la proponon de Itala Socialdemokrata Partio pri solvo de la lingva problemo en la tagordon de unu el la venontaj kunvenoj de la Internacio.

DANLANDO - Centra Dana Esperantista Ligo atingis jam 198 subskribojn de eksaj kaj nunaj ministroj kaj parlamentanoj sub la konatan Proponon de UEA al Unuiĝintaj Nacioj, kiu estis prezentita en 1966.

FINLANDO - La Filozofia fakultato de la Universitato en Helsinki aljuĝis al magistro V.Setälä honoran doktorecon. Lia uzo de Esperanto por kompara lingvistiko prezentis gravan parton inter la meritoj, kiuj kaŭzis la honorigon.

HAVAJO - Esperanto estas ĉi tie instruata al proks. 9000 (t.e. 60%) lernantoj de la sesa jaro en ĉiuj publikaj lernejoj. (laŭ "Esperanto")

ĈINIO - En fruprintempo ĉijara vizitis Ĉinion 10-membra japana kultura delegacio, en kiu estis du esperantistoj. En la popola Ĉinio la esp. movado fakte ne ekzistas kaj ĈEL restas kiel skeleto nur kun siaj prezidanto kaj vicprezidanto. Estas dubinde, ĉu "El Popola Ĉinio" estas parto de la movado ; ĝi estas verŝajne plie propaganda aparato de la registaro. (laŭ letero el Japanio)

ESPERANTISTO SLOVAKA (n-roj 5-6)aperigas programon de la 5-a jubilea kongreso de AE SSR en Martin (12.-15.7.74) Ĝi raportas ankaŭ pri la lastatempa laborkonferenco de ĈEA en Ostrava kun ampleksa informo pri la literatura konkurso de Starto kaj mencias preparon de la ĉeĥa kongreso. Tuta paĝo estas dediĉita al la aktiveco de ambaŭ federaciaj MEM-sekcioj. Aperas en ES regulaj rubrikoj Vegetarismo-Naturismo, specimenoj el Plena Vortaro kaj diskuto pri krucenigmoj. (k)

## Muzikista sekcio fondota

Estas preparata fondiĝo de sekcio de esperantistoj-muzikistoj de ĈEA. Al kunlaboro oni vokas ĉiujn instrument-muzikistojn, gekantistojn profesiajn kaj amatorajn, komponistojn kaj kapelestrojn, verkantojn de muzikaj tekstoj k faksciajn muziktekstajn tradukantojn, ĉiujn muzikpedagogojn kaj fakulojn.

Nia tasko estos per kunlaboro sur la muzika kampo kaj helpe de E-o servi al ni reciproke per eluzo de pretaj muzikaj tekstoj, per aranĝado de artismaj programoj, per reciprokaj vizitoj, per konigado de trezoroj de la internacia muzika kulturo, pri traktado de muzikteoriaj temoj k.s.

En la fondota sekcio grupiĝus muzikistoj-esperantistoj, membroj de Ĉeĥa E-Asocio, kaj ĝi kunlaborus kun la Muzika Esperanto-Ligo /MEL/ en Genova, Italio, kiu komisiis sian anon D-ron Lajos Lesznai en Budapeŝto iniciati fondiĝon de sekcio aŭ aparta grupo en la socialismaj landoj.

Bv. anonciĝi al: Miroslav Smyčka, SNP 39 400 11 Ústí n.L., Ĉeĥoslovakio. /jk/

UTILECON DE E-O ege pruvas ĝia rolo en la perado de la kulturaj valoroj. Nia redakcio turnas sin al ĉiuj, kiuj aktivas sur tiu ĉi kampo kaj petas konkretajn informojn pri la verkoj tradukitaj el E-o en la ĉeĥan kaj inverse, speciale depost 1945. Atentindaj estas ankaŭ artikoloj, studoj ktp. en la ĉeĥa aŭ E-o pri la kultura (literatura) interŝanĝo pere de la internacia lingvo. Adreso ĉe Starto, ĈEA.

## Esperanto en sociklasaj luktoj

Ulrich L i n s : LA DANĜERA LINGVO. Esperanto en la uragano de persekutoj. Eld.L'Omnibuso, Kioto 1973, 67 pĝ.,broŝurita.

La aŭtoro provas analizi en sia verko krizajn momentojn de la Esp. movado en la epoko, kiam ĝi aperas sur la scenejo de la sociklasaj bataloj. Li traktas tiun ĉi evoluon precipe en la antaŭ milita Germanio kaj Sovetio kaj aparte - kun speciala atento al Ĉeĥoslovakio - en la socialismaj landoj post 1949.

Tamen rilatigo inter la du malsamaj sociaj ordoj koncerne subpremon de la E-adeptoj iom vualigas la fakton, ke ĝuste en la socialismaj landoj la internacia lingvo - konforme al sia misio - ĝuis,kaj lastatempe reĝuas altan rekonon kaj disvastiĝon. Niaflanke necesas konkludi, ke Esperanto neniam povis esti izolita disde la sociaj fenomenoj,daŭre rolante en la fokuso de la historia batalo inter la socialismo kaj la kapitalismo.

La verko de Lins estas verŝajne unua serioza studo tiuspeca, kiu, surbaze de dokumentoj,interese rakontas pri la persekutoj kontraŭ IL, sed ankaŭ pri la heroeco kaj celkonscio de la esperantistaj amasoj. /kni/

Ivo A n d r i ć : SONĜO KAJ MALDORMO SUB LA KARPENETO.Eld.Internacia Kultura Servo,Zagreb 1972. El la serba trad.Imbert Roger kaj Tišljar Zlatko,pĝ.79.

Tiu ĉi novelaro prezentas la vivon de bosnia vilaĝano dum la aŭstro-hungara okupado,la vivon,kiu portas kelkjarcentan signon de l' turka subpremo. I.Andrić estas nobelpremiito el 1961 kaj lia vivoverko titoliĝas "La ponto super Drina". /k/

**AMIKAJN KONTAKTOJN ligos infangrupo de naturista societo en Nürtingen apud Stuttgart, kiu antaŭnelonge festis sian 50-jariĝon. Skribu al s-ro Joh. Windisch, D 7440 Nürtingen,Dürerplatz 4, FRG.**

ĈE AMIKOJ EN GUS ĤRUSTALNIA
/daŭrigo de la 1-a paĝo/

slovakaj kantoj. Gaja kaj amikeca medio - kun gitaro kaj kantoj en la rusa,ĉeĥa kaj esperanta lingvoj,rakontado kaj interŝanĝo de spertoj el la junulara agado, estiĝis dum niaj du kunvenoj kun la junaj komsomolanoj-aktivuloj.

Ankoraŭ pri unu sperto mi ŝatus rakonti.

En la regiona Domo de pioniroj en Vladimir ni ekkonis konkretan agadon de Klubo de Internacia amikeco /KIA/. Ĝi havas sian propran ejon kun ekspoziciaĵoj dediĉitaj al la amikeco kun GDR aŭ ĈSSR.

KIA havas bone ellaboritan idean sistemon de sia laboro kun la ĉefaj taskoj por la kuranta jaro kaj ĉiu monato aparte.Similaj kluboj ekzistas fakte en ĉiu lernejo, en ĉiu pionira domo. En ili la infanoj estas edukataj al socialisma internaciismo,al estimo por la aliaj nacioj,rasoj,popoloj.

Kiam mi post mia reveno rakontis en nia loka grupo de ĈEA pri miaj travivaĵoj kaj pri KIA, ni kune decidis helpi la Distriktan Komitaton de SLJ kaj la distriktan pioniran organizaĵon ĉe fondo kaj gvido de 4-5 tiaj kluboj en nia distrikto ekde septembro nunjara.Pri niaj spertoj ni ankoraŭ informos la legantojn. Z.Rusín

## Dankleteroj de VDR

**La ambasadejo de VDR en ĈSSR sincere dankas vin pro via belega rezolucio de la 22a de aprilo kaj pro la kampanjo "Ĉs. esperantistoj al la konstruanta Vjetnamio - skribas en sia letero al la Porpaca sekcio de ĈEA kaj AE SSR la ambasado de VDR en Praha. En alia letero skribis la direktoro de la Kultura kaj Informa Centro de VDR,k-do Dinh Gia Luy: "Via kampanjo atestas pri la noblaj celoj, kiujn via organizaĵo plenumas helpe de Esperanto, kaj ĝi pruvas fratan solidarecon inter la ĉeĥoslovaka kaj vjetnama popoloj".**

**ĈIJARE LA 31an DE OKTOBRO RIGA ESP. KLUBO ARANĜAS VESPERON DEDIĈITAN AL ĈEĤOSLOVAKIO KAJ PETAS SENDI SALUTOJN AL: Riga EK, 226098 Riga-C,p.k.499,LatviaSSR!**

# Rondeto vivo

B O R ,distr.Tachov - Jam la kvaran Esperanto-balon oni okazigis la 9an de junio, en la urba kastelo. Ĉeestis grupo de esperantistoj el GDR. La aranĝo altiris sufiĉe vastan publikon kaj rezultigis ankaŭ kontentigan financan helpon.

H O D O N Í N - LG ĈEA ĉe SZK ROH,Bratislavská str.2 intencas organizi kolektantojn de Esp. insignoj. Informojn pri tiu ĉi interesa iniciato legu en la venontaj n-roj.

H O Ř I C E - Sur la seplingva invita reklamtabulo por la vizitontoj de motocikla vetkuro sub la aŭspicio de la sportista organizaĵo "Svazarm" trovis sian lokon ankaŭ la Esperanto-versio.

J A B L O N E C n.N. - Salutleteron al ĉiuj pacbatalantoj en ĈSSR sendis la partoprenintoj de la internacia 50-kilometra marŝo "Kilometroj por la paco kaj amikeco", kiun fine de aprilo aranĝis la EK,sub aŭspicio de la Distrikta Packonsilantaro, subtene al la eŭropa sekureca konferenco kaj al la X-a tutmonda junularfestivalo en Berlino.

O S T R O V n.O. - Internacian renkontiĝon sub la devizo "Amikeco trans la limon ĈSSR-GDR" (9.-10.6.)partoprenis ĉi tie kelkdekoj da esperantistoj el K.Vary, Cheb, Kraslice kaj gastoj el GDR. La celo esti reciproka laborkontaktiĝo de la Esp. adeptoj el ambaŭ socialismaj landoj. Ĉeestis sekretario de ĈEA Zdenko Křimský, kiu informis funkciulojn de la kvar ER pri la konferenco en Ostrava kaj pri la aktualaj taskoj de la asocio.
La renkontiĝo sendube favore influis aktiviĝon de la esp. rondetoj en la regiono. K-doj Kafka kaj Würker de la loka ER esprimis deziron, ke ĝi fariĝu tradicia. Pri la aranĝo meritis ankaŭ la kulturdomo en Ostrov.

P O D Ě B R A D Y - Tradician, jam la 12-an renkontiĝon /29.6. - 1.7./ partoprenis pli ol 60 gesamideanoj. Dum la solena vespero kantis Mir. Smyčka, solkantisto de la operejo en Ústí n/Labem kun piana akompano de M. Tuch el Hradec Králové. Poemojn de L. Ukrainka deklamis gelernantoj el la loka ZDŠ. Dimanĉe okazis motorŝipa ekskurso al Cidlina.

P Ř E R O V - Solenan rememor-vesperon preparas la rondeto omaĝe al sia 50-jara jubileo por la 6a de oktobro je la 15-a horo en ZK ROH Přerovské strojírny (kafejo Sokolovna). Ĉiuj sincere invitataj !

P Ř Í B R A M - La klubanoj kunvenadas ĉiumerkrede eĉ dum la someraj ferioj.Ĉijare la klubo organizis sukcesan leter-vesperon ; la ricevitaj sendaĵoj estis modele ekspoziciitaj kaj vekis intereson ĉe la publiko. Sukcesa estis ankaŭ la prelego de P.Polnický pri lia italia "miela luno".
EK preparas jam la duan publikan ekspozicion kunlabore kun fotoamatora rondeto kaj en sian laborplanon ĝi envicigis ankaŭ popularigon de la regiono. Ĝia celkonscia agado trovas subtenon de la lokaj aŭtoritatoj : la sindikata klubo favoras kaj financas la rondeton,menciante dum siaj jarkunvenoj kaj en siaj publikaĵoj la laboron de ER frontflanke.

S E M I L Y - Entute 49 personoj el 11 Esp. rondetoj kaj kluboj partoprenis la I-an renkontiĝon de naturamikoj en Bozkov apud Semily. La plej multaj venis el Jablonec n.N., la plej aĝa partoprenantino estis s-ino Rejthárková,78 j.el Hradec Králové. Amuzan programon riĉigis la gitara grupo de R.Stínil, la kluba prezidanto el Semily, kun kantistino M. Rybářová kaj s-ro Šperling el Praha.

V S E T Í N - En junio oni finis du E. kursojn - la bazan kaj tiun por progresintoj. Post la konferenco en Ostrava la kluba jarkunveno decidis, ke la EK aliĝu al ĈEA kiel loka grupo.
Plenumante la programon de amikeco kun USSR oni aŭdigis i.a. litovajn popolkantojn en E-o, kion ebligis al LG ties korespondanto en Vilnius. Post la vespero pri Kubo oni sendis leteron al la tieaj esperantistoj kun la deziro kontaktiĝi.
La grupo lastatempe eldonis cirkuleron "Informoj de Vsetín", krome poŝtkarton kun desegnaĵo de ak. pentristo F.Podešva kaj kvarfolion "Valaŝio" kun la poemo de M. Jáhn "Al la naskiĝregiono" en la traduko de A. Berka kaj kun ilustraĵoj de Č.Borák.

SOMERA LERNEJO DE ESPERANTO en Liptovský Mikuláš (15.- 28.7.) ne realiĝis pro diversaj objektivaj malhelpoj.Kun bedaŭro informis nin pri tio la loka ER.

BONVENON AL GOTENBURGO - la noveldonita informilo senpage havebla ĉe: Turisma Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38, Svedio.

# Karel Kraft: Jakobo ne ŝatas fabelojn

Plenkreskante Jakobo ĉiam malpli zorgis pri fabeloj. Ofendita pro la trompado dejunaĝa li eĉ disvolvis teorion, ke ĉiuj fabeloj malutilas. Li konkludis, ke ili kontraŭas la prudenton kaj ke ili ĝenerale ĝenas la racie pensantan homon.Koncize : la fabeloj meritas kondamnon. Jakobo trovis same racie pensantan homon, kiu intencis fondi societon de fabelkontraŭuloj.Sed la kunbatalanto perfidis lin fondinte (aŭ klopodante fondi, mi ne memoras precize) klubon de bredistoj de senkornaj kaprinoj.

La sorto ligis Jakobon kun lia pli aĝa frato, kies infanoj ĉiuvespere maŭplekte petis lin :

"Rakontu al ni fabelon, ĉejo !"

Komence protestante li provis klarigi al ili sian firman sintenon, kiu ne permesas toleri la aĉan influon de la malraciigaj fabeloj.

"Tiaj estaĵoj kaj iliaj faroj fakte ne ekzistas", li diris, "la rakontantoj de fabeloj nur mistifikas vin, timigas vin, forlogas vin de la efektiva, bunta, plensanga reala vivo".

Kaj li poeziumis pri miraklo de ĝermanta semo, pri astronomiaj malkovroj... La infanoj silente aŭskultis kaj fine la pli karesema sukcesis grimpi sur lian genuon kaj ĉirkaŭbrakante lian kapon flustris :

"Mi volas timi la drakon".

Jakobo estis molkora. Por eviti drakfabelon li elpensis kuraĝan Marlena,kiu sukcesis alporti medikamentojn al sia malsana avino en neĝblova tempesto. Foje Marlena eĉ savis kapitanon el dronanta ŝipo. La infanoj streĉe aŭskultis kaj Jakobo opiniis, ke ili ne plu interesiĝas pri feinoj kaj diabloj. Por ekzameni ilin li demandis :

"Ĉu vi ankoraŭ kredas je drako ?"

Li ricevis surprizan respondon :

"Ne, ĉar ĝi vivas en groto kaj grotoj ne estas ĉi tie".

"Sed ĝi ja efektive ne ekzistas", protestis Jakobo.

"Jes, ĝi ne ekzistas", konsentis unu infano, "sed ĝi estas granda".

Kaj anstataŭ vespera rakonto okazis disputo. Jakobo ŝvitis kaj la infanoj ĝojis, ĉar ili konvinkis Jakobon, ke ekzistas diablo, ĉar ili vidis lin en iu televida filmo. Poste ili koncedis, ke la diablon prezentis eble iu aktoro, sed ili ankaŭ vidis inferon, kaldronojn, do, ie tie kaŝiĝas ankaŭ la Lucifero...

Fine Jakobo trovis Blanka n. Belan, allogan virinon, kiu pretis fariĝi lia edzino. Sed unu ŝia manko turmentis lin : ŝi tre ŝatis fabelojn. Ŝi ne nur volonte aŭdis ilin, ŝi eĉ provis interesigi lin pri ili. Baldaŭ ŝi komprenis lian opozician starpunkton kaj ne plu ĝenis lin. Ŝi sukcese evitis inciti lin, kaj Jakobo vere prave fieris pri sia edzino.

La tempo pasas... Ni povas vidi Blankan, la feliĉan edzinon de Jakobo, vizitanta kafejon. Ŝi ne venadas tien sola, ni povas vidi ŝin en akompano de iu viro. Li nun ĝuste sidas kontraŭ ŝi kaj demandas :

"Ĉu Jakobo ne suspektas vin ?"

"Ne, mia kara. Mi diris, ke mi vizitos dentkuraciston. Li naive kredos ĉiun fabelon, kiun mi diros al li".

(2-a premio en la literatura konkurso de Starto, fako originala prozo)

---

# La vivo plena de lumo

Ŝi estis kunfondintino de KFĈ,ĵurnalistino kaj poetino,fervora aktivulino inter la nevidantoj mem denaske blinda.En 1925 ŝi vizitis Moskvon kiel delegitino al la kongreso de Komunista Internacio. Per sia plumo ŝi arde defendas Sovetion kontraŭ ĉiuj kalumniantoj, riskante hejme nur mokojn kaj suspektojn ĉe l'aŭtoritatoj. Neforviŝebla estas ŝia spuro ankaŭ en la blindula Esp.movado. Nur grava senindulga malsano malhelpis k-dinon Emilie Suchardová (1893-1934) partopreni la kongreson de nevidantaj esperantistoj en Svedio ; la tago de ŝia forveturo estis la lasta en ŝia laborplena vivo. La naskiĝjubileon de tiu ĉi unika virino rememoris ĉijare ankaŭ la nevidantaj esperantistoj en ĈSSR. (kni)

## Okénko do sekretariátu

Polovina roku uplynula a nám nezbývá než konstatovat, že pouze 2 089 členů má zaplaceno členství na letošní rok. I když dodatečně zaplatí i všichni zbývající členové, přijde jejich platba teprve ve druhém pololetí. Tato skutečnost velmi komplikuje naši práci a hlavně plánování další činnosti. Uvažujeme proto o změně termínu plateb členských příspěvků tak, abychom již počátkem roku měli přehled nejen o počtu platících členů a odběratelů časopisů, ale také o stavu finančních prostředků, které máme k dispozici.

PŘEHLED MS /EK/ PODLE POČTU PLATÍCÍCH ČLENŮ SVAZU /k 30.6.1973/: Praha 256, Mělník 114, Třebíč 109, Brno PKO 100, Kopřivnice 79, VŽKG Ostrava 75, Vsetín 56, Třinec 45, Pardubice 44, Č. Budějovice 42, Hr. Králové 41, Jablonec n/N. 40, Olomouc a Plzeň 36, Č. Třebová 32, Opava 31, Šumperk 29, Paskov a Tábor 28, Liberec, Písek, Poděbrady a Příbram 27, Polička a Ústí n/L. 26, Žďár n/S. 25, Gottwaldov, O. Poruba a Stonava 23, Hranice 21, Humpolec, K. Vary, Kolín, Prostějov a Teplice v Č. 20, Hořice a Kyjov 19, Havířov, Havl. Brod a Znojmo SZTŠ 17, Bučovice 16, Miletín 15, Bor u Tachova a Vyškov 14, Lanškroun a Roudnice n/L. DPM 12, Ostrov n/O. Přerov a Semily 11, Boskovice, Most, Náchod, Příbor, Svitavy a Trutnov 10, Č. Lípa, Frýdlant n/Ostr., Hodonín, Jaroměř, Roudnice n/L. SZTŠ 9, Brno I.B., Králíky, Cheb, Městec Králové, Místek a Znojmo MOB 8, Praha ČSD 7, Kladno 6, Č. Dub, Lichnov, H. Počáply, N. Jičín a Slavkov 5.

PODPORUJÍCÍ ČLENOVÉ SVAZU v roce 1973: Š. Dimnjakovič, B. Grym, B. Metznerová, J. Rada, arch. J. Drlík, A. Drlíková, MUDr. J. Černý, J. Patera, Vl. Rosypal, D. Novotná, O. Sklenčka, M. Hromas, L. Kafka, M. Čekal, R. Kopecká, Vl. Boudar, B. Dorazilová, K. Steffel, V. Mitáček, V. Havel, ing. Vl. Kočvara, J. Hamáčková, Ant. Lauterbach, J. Lokšan a M. Cvalinová.

PŘEHLED DÁRCŮ v roce 1973: Fr. Tichý 22.-, M. Klementová 21.-, V. Střihavka 6.-, Fr. Pytloun 25.-, V. Kaňoková 10.-, M. Vybulková 26.-, Th. Kilián 1 000.-, M. Barton 6.-, A. Bárochová 20.-, J. Provázek 10.-, EK Plzeň 100.-, J. Jelen 100.-, Il. Venturová 10.-, I. Maroušková 10.-, M. Maierová 10.-, M. Buchl 10.-, ing. P. Porobek 20.-, P. Šestáková 10.-, L. Bíca 20.-, arch. J. Drlík 100.-, J. Kovář 22.-, Ant. Tobiášek 50.-, A. Rýznarová 50.-, V. Kalousková 25.-, J. Strnad 32.-, J. Metelka 10.-, J. Tršková 10.-, K. Sekyra 20.-, V. Straka - 50.-, M. Balová 15.-, M. Schreiberová 26.-, J. Štancl 10.-, Fr. Kudr 100.-, M. Pelcová 22.-, Dr. J. Hermach 100.-, Ludm. Rašnerová 10.-, A. Chourová 22.-, J. David 22.-, L. Stodůlková 52.-, L. Šebestík 12.-, Vl. Kasal 22.-, ing. J. Růžková 32.-, M. Maršálková 20.-, J. Nedoma 102.-, J. Šmíd 100.-, Vl. Rataj 26.-, J. Dominik 50.-, J. Žitný 26.- a Žitná M. 26.-. Všem dárcům a podporujícím členům srdečně děkujeme za jejich pochopení!!

Časopis JUNA AMIKO pro mládež i dříve narozené si můžete zajistit zaplacením ročního předplatného 15.- Kčs. Ve školním roce 1973-74 vyjdou 3 čísla, formát 20 x 14 cm, 24 stran, dvoubarevný tisk. /SBČS Praha 2, č. účtu 02 - 4632 - 7./

SKP - slosovatelné knižní poukázky jsou opět v prodeji! Cena poukázky je 10.-Kčs, při odběru více než 20 ks poskytujeme slevu 0,50 Kčs za ks. SKP Vám pošleme obratem po obdržení příslušné částky, pouze při velkých objednávkách možno platit dodatečně. Slosování bude provedeno v Praze dne 24. října 1973. 1. cena - zájezd do Hamburku na UK nebo zboží v hodnotě 2 000.- Kčs dle vlastního výběru v Príoru !!! Celkem 100 cen. Všechny poukázky budou, bez ohledu na to zda vyhrály, vyměněny do 31. ledna 1974 za svazové publikace, odznaky a materiály dle Vašeho výběru.

---

S T A R T O - eldonas ČEA, p. k. 8, 120 21 Praha 2. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro O. Knichal. Red. komitato: ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. Abonebla por la asociaj membroj. Dohlédací pošta Praha 07, sníž. pošt. popl. povoleno ŘP Praha j.zn. P/1-2283/71 ze dne 6. 5. 1971. Do tiskárny předáno 25. 7. 1973.